
ktp!
majo/junio 1996



# Let's Party!

Ni feliĉe anoncas, ke dum 1997 USEJ celebros sian lignan datrevenon! (Jes ja, USEJ ekzistas jam preskaŭ kvin plenajn jarojn. . . ) Kaj ni esperas, ke VI helpos nin celebri la okazon!

La kvina datreveno ĝenerale ne estas tiom festata afero, sed la unuaj kvin jaroj de iu estaĵo certe estas la plej gravaj. Do, kial ne partopreni en la festo?

La Estraro multe cerbumas nun organizi amuzajn aferojn helpi celebri nian kvinan jaron, sed ni esperas, ke ankaŭ vi volos plusendi kelkajn ideojn.

Krom celebri, ni uzos nian kvinan datrevenon kiel konvenan okazon pripensi kion ni atingis kaj kion ni atingos. Nun ni kompilas historion de la junulara E-movado en Usono. Se vi scias ion pri ĝi, certe sciigu nin.

Senrigarde de kiel fakte vi celebras nian grandan 5an datrevenon, certe kontaktu nin por ke vi ne maltrafu ĉi tiun bonegan celebron!

We're happy to announce that in the year 1997 USEJ will be celebrating its wooden anniversary! (Yup, we've actually been around for nearly five years.) And we're hoping that YOU can help us celebrate it!

The fifth anniversary is generally not earth-shattering, but the first five years of any being are undoubtedly the most important. So why not take some time out to celebrate it?

The Board is already hard at work putting together some fun stuff to mark our fifth year, but we're hoping you'll have a couple of ideas to send along as well.

In addition to celebrating, we're hoping our fifth anniversary will also be a good time to take a look at where we've been and where we're going. We're working right now on compiling a history of the youth movement in the United States. If you happen to know anything at all about the history of the Esperanto youth movement in the US, please let us know.

Regardless of how you choose to mark our big 5th, make sure you get in contact with us so you don't miss this big celebration!

Josef

# Esperanto-Kafejoj Babiligas Junulojn en Philadelphia, Baltimore

***You might not necessarily have the energy or time to organize a weekend get together or plan a massive promotional campaign, but you can still do a lot of small things to let people know about Esperanto and its uses.***

***For example, you can try writing an article about the language for the campus newspaper (generally, most newspapers are in desperate need of well-written, interesting articles, so getting published sometimes isn't quite as difficult as you might imagine) or hanging up attractive but simple flyers about Esperanto around the area.***

***If you need any assistance, contact the editor of ktp! or one of the board members of USEJ. USEJ has plenty of resources that will help you along, such as copies of articles about Esperanto from magazines such as Time and the Smithsonian, and great, professional flyers about Esperanto printed by TEJO in dozens of languages.***

***Regardless of what you try, drop us a line so we can pass on the news!***

## *Pennsylvania*

◆ **Philadelphia**

Du junaj Esperantistoj, Noam Mohr kaj Daniel Schanbacher, kunvenis en kafejo en Philadelphia antaŭnelonge. Noam estas studento de Universitato de Pennsylvania, kaj Daniel ĉe Universitato Drexel. Malgraŭ la malbona sperto dum la unua renkontiĝo (laŭ Daniel, ili ambaŭ malsaniĝis pro la kafo poste), Daniel volus renkonti pli da junaj Esperantistoj en la urbo (ja estas almenaŭ ses aŭ sep sendube en Philadelphia!), do kontaktu lin: (215) 243-1120



---

*USEJ Biblioteko*



**Ĝustatempe por la 82a UK-Adelaide '97!**

Se vi iam volis scii la Esperantan tradukon de la oficiala himno de Aŭstralio aŭ Nov-Zelando, rigardu The Australian Esperantist, septembro / oktobro 1992. (Jen bona kviza demando: ĉu vi eĉ konas la oficialajn himnojn de tiuj landoj? La respondo: "Antaŭen Aŭstralio" kaj "Di' de Ĉiuj Antaŭ Vi", respektive.)

# Esperanto-Kafejoj Babiligas Junulojn en Philadelphia, Baltimore

◆ **Pittsburgh**

Laŭ raporto de Daniel Cuthbert, USEJ-estrarano Jed Meltzer faras interesan interŝanĝon antaŭnelonge. . . li instruas al amiko Esperanton, kaj lia amiko instruas al li kiel fari TTT-paĝon. Do, ambaŭ junuloj lernos utilajn aferojn samtempe. Farinde, ĉu ne? Kaj, kompreneble, Jed, qratulojn pro la sekvinda ideo!

## *Maryland*

◆ **Baltimore**

Dank' al la nekredebla proksimeco de la pasinta kaj nuna prezidanto de USEJ, Baltimore spertis sufiĉe esperplenan Esperantan agadon lastatempe.

La 14an de aprilo Joseph Truong deĵoris ĉe budo pri USEJ kaj Esperanto dum "Travel Day '96", internacia vojaĝfoiro okazanta ĉe la Baltimore Internacia AYH Junulara Gastejo. De la pli ol 200 partoprenantoj, venis 25 interesatoj al la Esperanto-budo, do ne tro malbona rezulto por unua provo. Pli grave, la okazo donis al USEJ-Baltimore eblecon krei surprize amikan rilaton kun ĉefuloj de la Gastejo.

Joseph kaj Daniel Cuthbert estis inter tiuj kiuj ĉeestis la mondan premieron de David Gaines la 17an de aprilo ĉe la Muzika Konservatorio de Peabody. (Legu la artikolon pri ĝi en ĉi tiu numero!).

EsperantoCafe, babilgrupo pri Esperanto, komenciĝis la 19an de aprilo kaj kunvenis preskaŭ ĉiujn vendredojn ĉe kafejo kiu situas inter la Universitato Johns Hopkins kaj la Kolegio Loyola.

De la 15a ĝis la 17a de junio, junaj Esperantistoj renkontiĝis neformale ĉe la nova apartemento de Daniel por sentema "duona JES".

---

*USEJ Biblioteko*



**Ĉu via loka klubo bezonas novan ideon por vivigi kunsidojn ĉe via loka klubo?**

Legu la artikolon "Sukcesaj Klubaj Vesperoj" de Normand Fleury, Alumeto, vintro 94-95, p.28.

# Esperanto-Kafejoj Babiligas Junulojn en Philadelphia, Baltimore

## Florida

### ◆ Clearwater

De nia ĉiam laboranta aktivulo en Florida Guy Menahem ni eksciis pri la venonta 1996 Kongreso de la Florida Esperanto-Ligo.

Ĉi-jare ĝi okazos inter la 9a kaj 11a de aŭgusto en junulara gastejo en Kissimmee. Laŭ la Verda Stelo (la novaĵletero de FEL), la gastejo ĉi-foje estas aparte belega (ĝi eĉ havas propran lagon!) kaj funkcios kiel kaj dormejo kaj kongresejo.

La kotizoj por junuloj por la tuta semajno estas nur $55, kaj pagas por du noktoj en la gastejo, programkotizoj, manĝaĵoj kaj vizito al loka media studa centro, do vere malmulta kotizo por ĉio!

Se vi interesiĝas ĉeesti, kontaktu Guy ĉe:

Florida Esperanto-Ligo
2049 Larchmont Way
Clearwater FL 34624
(813) 530-0243

*Cetere, Guy, bonegan kongresumadon!*

@Subhead@Washington

### ◆ Olympia

Alia fervora Esperanta aktivulo Briano Krueger dum JES parolis pri sia laboro pri Esperanto. Li nun instruas Esperanton al junuloj en lernejo en sia urbo. Cetere, vojaĝinte kelkajn monatojn tra Kubo (ŝŝŝ, . . . ja estas sekreto), li daŭre subtenas la Esperantistojn tie, kiuj kompreneble frontas ŝajne nekalkuleblajn limigojn:

Briano Krueger
204 4th Ave, W #313
Olympia, WA 98501
(360) 943-4610


---

*USEJ Biblioteko*



**Ĉu vi scias la historion de la "ne-oficiala" himno de Esperanto?**

Eksciigu je p. 74 de Esperanto, aprilo 1994.



# Korespondpetoj

Stasnislav DZJUBA
ul. Novatorov 30/-195
RU-344038 Rostov-na-Donu 38
Rusio

Mi estas 19-jara kaj studas en Akademio de Agrikultura Maŝinkonstruado. Mi interesiĝas pri scienco, politiko, aŭtoj, mondo de bestoj kaj de insektoj, laboro de advokato en juĝprocesoj, fantasto (mia amata verkisto estas Philip Jose Farmer...), sociaj konfliktoj, terorismo, varia muziko.

Abdesselam ARIF
Rue 3 No. I4
Bayad Somaa
MA-23000 Benio Mellal
Maroko

Maroka E-isto deziras korespondi kun usonaj E-istoj.

Aleksandro PESTI
To u. 20
HU-6723 Szeged
Hungario

Juna hungara skolto kiu deziras korespondi kun usonaj geskoltoj.

Krisztián SZÜCS
Szepesi u.77
HU-4030 Debrecen 2
Hungario

Mi lernas en kvina klaso de la baza lernejo (11-jara). . . nun mi komencis lerni Esperanton. Mi kolektas kaj sendas kolorajn bildkartojn.

CODJO Jean
BP 03-3589
Cotonou
Benino

Mi studas germanistikon kaj jam estis en Germanio la pasintan someron. Angle, france, germane kaj esperante, kaj ses aliajn afrikajn lingvojn mi parolas. Mi estas 29 jaraĝa.

P. Akizignim HALAOUI
p/a Potchonessa Halaoui
ENA
BP 64
Lome
Togo

18-jaraĝa junulo kiu delonge sopiris korespondi kun usonan(in)o por interŝanĝi ideojn.


---

*USEJ Biblioteko*



**Vi certe legis ie pri tiu mistera lando Nepalo. . .**

Nun spertu por vi mem! Legu Montejon, n-ron 3, oktobro-decembro, 1992.



# *NAJTumu en '96!*

***If the summer heat has simply become too unbearable, try heading up to the mountains this summer to NAJT '96 for a little relief and a lot of fun. Amidst the cool, relaxing Adirondacks meet young people from USEJ and the Quebec Esperantist Youth Organization, as well as from overseas, such as the Czech Republic!***

Kaptu okazon ne nur malstreĉiĝi kaj ripozi en la agrabla (kaj sufiĉe malvarmeta!) Adirondaka Montaro sed ankaŭ babili en Esperanto kun junuloj de Kebekio kaj aliaj landoj dum la 2a Norda Amerika Junulara Tendumado!

La ĉi-jara NAJT fakte okazos en la sama loko kiel la antaŭa loko (Wakonda Family Campgrounds, en Pottsville, norda Novjorko) kaj eĉ dum la preskaŭ sama semajnfino (de la 23a ĝis la 25a de aŭgusto, do la antaŭlasta semajnfino de aŭgusto).

Sed ĉi-foje kunorganizas ĝin reprezentantoj de USEJ (Daniel Cuthbert, Brian Krueger kaj Joseph Truong) kaj la Kebekia Esperantista Junulara Organizo (Normando Fleury kaj Bill Mak). Do, ni certe esperas je multe da partoprenantoj de ambaŭ flankoj de la bordo ĝui tian unikan, internacian sperton en Norda Ameriko.

La tendumejo estas aparte vidinda loko. Situanta meze de la montaro en norda Novjorka ŝtato (proksimume 4 horojn norde de Novjorkurbo kaj 2 horojn sude de Montrealo), la tendumejo ofertas ne nur bone prizorgatajn tendlokojn kaj banlokojn, sed ankaŭ i.a. lageton kaj marŝvojetojn.

La kotizo por la tuta semajnfino estas nur $25, kio inkluzivas manĝaĵojn, programkotizojn, kaj spacon por tendo. Kiel en 1994, la programo estos sufiĉe neformala kaj amuza, kun antaŭvidataj ekskursoj tra la montaro, kantado, naĝado, ludoj kaj aliaj tiaj frenezaĵoj.

Por pli da informoj, kontaktu: NAJT '96
Daniel Cuthbert
3215 N. Charles St. Apt #1010
Baltimore MD 21218
(410) 467-1371
email: `NAJT96@aol.com`

# juna amiko

## *Recommended Reading for Any Age*

***Fakte, la titolo de la mondkonata Juna Amiko estas iom trompa, ĉar la gazeto povas fariĝi amiko al iu Esperantisto, senrigarde de la aĝo. Dank' al spritaj legaĵoj de Stefan MacGill kaj amuzaj desegnaĵoj de Pavel Rak, Juna Amiko estas tre konsilinda eldonaĵo kiu ja daŭre estas alloga kaj instrua.***

Undoubtedly, high-quality, attractive material in relatively easy Esperanto is pretty hard to find nowadays. That's why magazines such as Juna Amiko are so well-cherished and recommended to beginners, regardless of age

While Juna Amiko, as the name might suggest, is geared primarily towards children and adolescents, it nevertheless is a noteworthy and informative publication for older Esperantists as well.

Published four times a year by the International League of Esperantist Teachers, Juna Amiko is edited by Stefan MacGill in Budapest, but has contributions of readers from around the globe. Simple but amusing drawings by Czech artist Pavel Rak keep the magazine comic and light.

Thanks to both MacGill and Rak, the magazine, which recently celebrated a milestone 75th issue, is inviting and fun to read. Each issue generally features one specific topic (such as "vojaĝi", "ŝanĝi", "komuniki", which is explored through feature articles, games, dialogues, etc.

Juna Amiko is surprisingly successful in tackling fairly heavy issues for a magazine geared towards young people. Issue 96/1 features as its discussion topic "Energy". In addition to learning some basic concepts about energy, the

---

USEJ Biblioteko

**Ĉu vi scias kiel diri "Mi amas vin!" en 33 lingvoj?**
Rigardu p. 3 de Jen!

# juna amiko

issue also deals with more specific dilemmas of energy, such as the problems and promises of atomic energy.

Some particularly impressive features in Issue 96/1 are an extensive chart of various advantages and disadvantages eight common forms of energy and a role playing game which gives young people a chance to discuss how a fictional Frivoland can solve its energy crisis. I can't imagine the number of children around the world who will be questioning their parents about their energy choices after reading this issue. . .

Single issues cost 5 NLG (roughly $3.50). A single year subscription is available via ELNA for $12. However, there are significant discounts for group subscriptions! Ordering two to nine copies sent to the same address costs $9 per subscription annually, while ordering ten or more copies will cost only $6 per subscription.

For more information, contact ELNA or Juna Amiko. pf. 193, HU-1368 Budapest, Hungary.

## *GAJNU! WIN!*

Gajnu la specialan numeron de Juna Amiko pri energio! Simple sciigu nin pri viaj ideoj por venontaj numeroj de **ktp!** antaŭ la 30a de novembro kaj havu ŝancon gajni tiun aparte legindan numeron.

Win the special issue of Juna Amiko about energy! Simple drop a line to the editor about your ideas for future issues of **ktp!** before November 30 and be elgible to win that issue.

*USEJ Biblioteko*

**Tre legenda estas la trista korea fabelo pri la fidela filino,**
en pp. 7-9 de La Espero el Koreio, januaro-februaro 1994

# YET ANOTHER USEJ SERVICE: FLYING CARPETS

Nekonata verŝajne al multaj membroj estas aparte utila kaj grava servo, la USEJ Biblioteko. En lando tiel granda kiel Usono kun tia relative malgranda movado, la Biblioteko ja povas helpi vin mem sperti en via propra loĝejo la eksteran Esperantan mondon sufiĉe facile, rapide kaj eĉ malmultekoste.




A flying carpet. . . that's exactly what the USEJ Library is. You travel in comfort and style throughout the world, exploring everything Esperantist and non-Esperantist, through the hundreds of Esperantist publications that the USEJ Library holds.

As an USEJ member, all you have to do is simply choose from the various titles listed in the Library Catalogue and send off the order to USEJ. Within a couple of days, you'll be off. . , learning foreign languages, seeing hidden corners of the world, and using Esperanto as a key to understanding other ideas and concepts.

Don't think that magazines in Esperanto are all boring or only talk about the movement-- far from it. Throughout this and future issues of KTP!, you'll see little boxes on intriguing articles in magazines which the USEJ Library has. You'll see that a surprising number of publications talk about things more than just club meetings.

For more information, contact Joseph Truong at the editorial address inside the back cover.



---

*USEJ Biblioteko*

**Jules Verne...**
estis aparte fama verkisto, kaj unu el liaj verkoj "La Verda Radio" aperas kiel traduko en la literatura numero de Fr anca Esperantisto, n-ro 463.

# Monda lingvo por monda premiero



***Recently, the innovative composer David Gaines had a world premiere of his classical piece "Spiritstatoj" at the Peabody Conservatory of Music in Baltimore. Particularly noteworthy about this piece was that all the titles were in Esperanto. In addition to composing music, he has also been active over the years in working and promoting Esperanto, especially among fellow composers***

Kvankam artistoj uzas Esperanton en diversaj stiloj de muziko, oni ne multe aŭdas pri la uzado de Esperanto en klasika muziko. Do, sendube, koncerto de klasika muziko kiu fakte uzas Esperanton estas jam en si mem sufiĉe speciala evento.

Sed usonaj Esperantistoj ja povas esti tre fieraj, ke klasika verko kiu uzis Esperanton havis sian mondan premieron ĉi tie antaŭnelonge. La monda premiero de la muzika verko "Spiritstatoj", komponita de David Gaines, okazis la 17an de aprilo en la Koncerthalo Miriam A. Friedberg de la Muzika Konservatorio Peabody en Baltimore; ĉirkaŭ 300 personoj venis al la koncerto.

"Spiritstatoj" estas dividita en tri partojn: "Fiero", "Kontemplacio" kaj "Ĝojo". Laŭ artikolo en la urba arta novaĵĵurnalo City Paper, S-ro Gaines diris, ke ili reprezentas "variajn statojn de la menso, prezentatajn unuope, kiujn persono eble havos dum sperti ian specon de rilato."

La titoloj por la diversaj eroj de la verko certe taŭgas. La verko komenciĝas sufiĉe laŭte kaj rapide per "Fiero". Tamen, la etoso fariĝas pli serioza per "Kontemplacio". La ritmo estas multe malpli rapida, kaj eĉ pli pensema. Nur kelkaj el la blovinstrumentoj ludas ĉi tiun eron, do la sento estas iom pli trankvila. Sed, la etoso ŝanĝiĝas denove je la fino ("Ĝojo"), kiu estas, kiel oni imagas, tre verva kaj sprita.

---

*USEJ Biblioteko*



**"Kia koincido!"**

Ĉu vi konas ilin? Certe malkovru ĉi tiujn kulturajn stelojn pri legendajn sur paĝoj 18-19 de Esperanto Aktuell, novembro 1990.

# Monda lingvo por monda premiero

Ja laŭdindas, ke David aktivas ne nur en la muzika sfero (krom verki, li instruas pri muziko kaj recenzas muzikon kaj muzikajn eventojn), sed ankaŭ en la Esperanta sfero. Dum kelkaj jaroj, li estis prezidanto de la Esperanto-grupo en Vaŝingtono, D. K. kaj eĉ helpis organizi la 35an Nacian Kongreson de Esperanto tie en 1987. Studante nun en Baltimore, li estas UEA-delegito por tiu urbo. Cetere, li gajnis la unuan lokon en la muzika kategorio de la 1995 Belarta Konkurso de UEA.

David havas aparte specialan rilaton kun USEJ mem. Estis ĝuste li, kiu verkis leteron en malfrua 1991 kiu instigis junajn membrojn de ELNA refondi la nacian junularon. Li estis la junulara komisiito de ELNA, kaj laboris delonge por restarigi la junularan E-movadon en Usono.

Li daŭre verkas muzikon kiu uzas iel Esperanton, inkluzive simfonion kiu havas ĥoron, kantatan tute en Esperanto. Certe, ni sciigos vin per estonta numero de *KTP!* la daton kaj lokon de la monda premiero de tiu evento. Se vi iel povus ĉeesti por montri ne nur vian subtenon al Esperanto en muziko, sed, pli grave, al la laboro de David mem, venu!

David dissendas dum la jaro informilojn perkomputile pri siaj lastaj muzikaj novaĵoj. Se ankaŭ vi intersiĝas, kontaktu lin ĉe:

David Gaines
114 W.Mulberry St.
Baltimore, MD 21201-3619
(410) 332-4283
gaines@gigue.peabody.jhu.edu



---

*USEJ Biblioteko*



**Vojaĝu al la ekzoktika Galapaga arkipelago . . .**
per Venezuela Stelo, pp 4-5, decembro 1991.

# Usono gajnas la trian lokon!

***USEJ, compared with other Land Sections of TEJO, actually isn't doing all that badly. Generally, with close to one hundred members, USEJ is one of the bigger Land Sections of TEJO. But how big really is USEJ in comparison with its own youth population? Well, that's another story...***

Verdire USEJ ne estas tiom malgranda relative al aliaj Landaj Sekcioj de TEJO. Tamen, kiam oni kalkulas relative al la loĝantaro de junuloj mem, oni vidas tute alian flankon.

Jen vi vidos kiom da membroj kiujn variaj Landaj Sekcioj havas por milionoj da junuloj entute en tiu lando. Mi uzis membrajn informojn en la Jarlibro 1995 kaj kalkulojn de la UN pri la junulara loĝantaro (personoj inter 15 kaj 29 jaraĝaj) de tiuj landoj.

Laŭ la UN, en Usono loĝas ĉirkaŭ 55.5 milionoj da junuloj, do estas nur 2 USEJ-membroj por 1 miliono da usonaj junuloj! Tiel ni gajnas la trian lokon-- de la lasta.

La unuan premion gajnis Slovakio, kun sufiĉe impona 373 membroj por miliono da slovakaj junuloj. (Laŭ tiu proporcio, USEJ devus havi almenaŭ 20,748 membrojn!)

La dua estas Hungario kaj la tria Belgio. Fakte, Belgio verŝajne havas pli ol 145 membroj por miliono, ĉar mi uzis la informojn de la Flandra E-ista Junulara Asocio kontraŭ la TUTA junulara loĝantaro de Belgio. Se mi havus la junularan loĝantaron de nur Flandrio, certe tiu cifero estus multe pli granda.

Memoru bone, ke ĉi tiuj ciferoj signifas nur kiom da membro; por miliono da junuloj. Ĝi neniel spegulas la fortecon de Esperanto en iu lando, la laboremon de la LS en tiu lando aŭ ion similan! Ja ekzistas multege da aliaj faktoroj (kiel membrokotizo, "rekta" membreco en la organizo anstataŭ "asocia" membreco, ktp.) En tiu kazo, do, ankoraŭ restas espero por Usono!

---

*USEJ Biblioteko*

**Kiujn sakraĵojn oni uzas en la Centrala Oficejo de UEA?**
Nu, vidu la oficialan respondon de la direktoro mem, Osmo Buller, sur p. 30 de Esperantolehti, majo 1992.

# Usono gajnas la trian lokon!

| Landa Sekcio de | membroj/ miliono da junuloj | Landa Sekcio de | membroj/ miliono da junuloj |
|---|---|---|---|
| Slovakio | 373.85 | Nederlando | 22.72 |
| Hungario | 283.04 | Britio | 21.31 |
| Belgio | 145.00 | Svisio | 20.71 |
| Germanio | 139.39 | Grekio | 17.39 |
| Svedio | 70.59 | Italio | 14.84 |
| Finnlando | 60.00 | Zairio | 10.36 |
| Israelo | 40.71 | Koreio | 9.52 |
| Kroatio | 33.33 | Francio | 5.24 |
| Haitio | 29.50 | Kanado | 5.00 |
| Madagaskaro | 29.49 | Brazilo | 2.31 |
| Bulgario | 27.37 | **Usono** | **2.00** |
| Aŭstrio | 26.47 | Argentino | 1.05 |
| Danlando | 25.45 | Ĉinio | 0.86 |
| Ĉeĥio | 25.00 | | |

PS- Mi ĵus eksciis, ke nia membraro fakte malaltiĝis. . . ve!

*USEJ Biblioteko*

**Kiuj ĝuste estas la "kurda" popolo?**

Arje Eliav priskribas la historion de la Kurdoj en Israela Esperantisto, pp. 14-16, junio 1992.

KTP!

624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
jtruong@loyola.edu
ISSN 1078-6554

**********

Founded in 1993, it is the official newsletter of the US Young Esperantists. It is published 6 times a year and sent out to all members and supporters of USEJ.

Contributions may be sent to the address above. Opinions expressed in articles are those of the authors and not of USEJ or the Editor.

**********

Fondita en 1993, ĝi estas la oficiala novaĵletero de la Usona Societo por Esperantista Junularo. Ĝi eldoniĝas 6 foje jare kaj estas dissendata al ĉiuj membroj kaj subtenantoj de USEJ.

Kontribuaĵoj estu sendataj al la adreso supre. Opinioj esprimitaj en artikoloj estas tiuj de la aŭtoro kaj nek de la Redaktoro, nek de USEJ.

**********

*Redaktoro/Editor:* Jozef Truong
*Kompostisto/Layout:* Sybil Harlow

Articles may be submitted via email to
usej@webcom.com
(please use the ASCII-x format)

Artikoloj povas esti senditaj per reto al
usej@webcom.com

### *Usona Esperantista Junularo*

USEJ is a non-profit, national organization for US Esperantists 27 years old and under.

Donations, subscriptions, etc., can be made payable to "Usona Esperantista Junularo" and sent to the treasurer or the ELNA CO.

USEJ estas senprofita organizo por junaj (malpli ol 27 jaraj) Esperantistoj en Usono.

Donacoj, abonoj ktp. pageblas al "Usona Esperantista Junularo" kaj sendeblas al la kasisto aŭ la ELNA Centra Oficejo.

Membership/Membreco: $15/year
Subscription to KTP!/
abono al KTP!: $15/year

Treasurer/kasisto
Nathan Treadway
3769 South A Street
Richmond, IN 47374

ELNA Central Office
PO Box 1129
El Cerrito, CA 94530
(510) 653-0998
elna@netcom.com

ktp!
624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
ISSN # 1078-6554